# TEA-BULTENO

1ª JARO — MAJO 1998 — NUMERO 4

## AGENDO

**1 V Sidejo fermita**
2 S
**3 D**
4 L Konversacia rondo
5 M Ordigo de asocia arkivo
6 M
7 Ĵ
8 V El «Unu verkanta esperanto» - G. Valente
9 S
**10 D**
11 L Konversacia rondo
12 M Ordigo de asocia arkivo
13 M
14 Ĵ
15 V Ekskurso tra la vortaro: ankoraŭ pri kuirarto!
16 S
**17 D**
18 L Konversacia rondo
19 M Ordigo de asocia arkivo
20 M
21 Ĵ
22 V Komuna studado de UEA-historio
23 S
**24 D**
25 L Konversacia rondo
26 M Ordigo de asocia arkivo
27 M
28 Ĵ
29 V Spektado de vidbendoj pri Triesto
30 S
**31 D**

## Vortoj de la redakcio

Jam for estas la 10ª Alp-Adria Esperanto-Konferenco, sed ankoraŭ ne la memoroj pri ĝi. Ĉefe por tiuj kiuj sindediĉe kaj senhalte laboradis por ĝiaj organizo kaj surloka prizorgado.

Mirinda la konferencejo, neriproĉinda la servado, ĝuinda la tuta programo, ankaŭ pro la ebleco ĉeesti kaj prelegojn kaj distraĵojn proponitajn de la junularo samloke festivalanta. Bedaŭrinde torento da mallaŭdaj kritikoj inundis la kompatindan organizan teamon pro la aĉa mismendo de... «bona vetero». Fakte pluvo kaj malvarmo ĉiutage sin prezentis: sekve de tio, jam nun oni ĵuris, ke por la venonta Esperanto-aranĝo obliĝos la klopodoj plibonigi la rilatojn kun la koncerna Supera Instanco, por ke suno kaj agrabla temperaturo absolute ne manku dum niaj kunvenoj!

Aparte sukcesa estis la Seminario pri instruado. Nenia plendo aŭdiĝis flanke de la partoprenintoj, kvankam dum multaj, sinsekvaj horoj ili devis submetiĝi al tre intensa trejnado. La personeco, la vervo kaj la metodiko de la gvidanto Stefan MacGill katenis tre forte ĉies atenton kaj interesiĝon: tio estis aparte favorata de la fakto, ke ĉiu seminariano sentis sin aktive engaĝita en ĉiu instrusituacio.


Esperantistoj el Aŭstrio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio kunvenis asemblee kaj pritraktis ĉefe la demandon, ĉu valoras aŭ ne la penon daŭre organizi Alp-Adriajn konferencojn, konsiderante ke entute malmultaj interesiĝas kaj kunlaboras por realigado de io konkreta. Post iom da diskutoj, oni konklude decidis prokrasti la problemon ĝis la venontjara Konferenco, okazonta iuloke en Kroatio, fare de Marija Beloševiĉ.

Grava rezulto de niaj renkontiĝoj estas la propono de la parlamenta deputito d-ro Di Bisceglie, partopreninta la oficialan malfermon de la Konferenco kaj Junulara Festivalo, doni al strato de *San Vito al Tagliamento*, friula urbeto, la nomon de la eldonisto Antonio Paolet, tie naskiĝinta. Kelkajn tagojn post la konferenca fermo, Edvige Ackermann kaj Giuseppe Valente kunvenis kun la skabenoj de la Komunumo de *San Vito al Tagliamento*, je ĉeesto i.a. ankaŭ de la deputito, dum kiu estis decidite, ke ricevos la nomon de A. Paolet la urba Biblioteko. Paolet estis fervora esperantisto, kiu multe aktivadis por Esperanto: li fondis sian eldonejon en *San Vito* jam en 1913 kaj ekde tiu jaro ĝis 1929 li eldonis ankaŭ la gazeton de la iama Itala Esperantista Federacio, krom multaj lernolibroj, vortaroj kaj literaturaj verkoj, inter kiuj la «Historio de Kristo» de Papini kaj «Ŝakludado» de G. Giacosa.

La aranĝo ricevis subtenon de multaj instancoj, inter kiuj la Regiono Friulo Jul-Venetio, la provinco de Udine, la Komunumo de *Lignano Sabbiadoro* kaj la Turisma Entrepreno de *Lignano Sabbiadoro* kaj *della Laguna di Marano*. Ĉi tiu lasta eĉ eldonis esperantlingvan version de tre bela, bunta kaj bildoriĉa prospekto pri *Lignano Sabbiadoro*, nia konferencloko.

Do, estas dezirinde, ke kiel eble plej multaj esperantistoj petu tiujn fald-foliojn en Esperanto rekte de la:

Azienda di Promozione Turistica
di Lignano Sabbiadoro e della Laguna di Marano
Via Latisana, 42 - IT-33504 Lignano Sabbiadoro UD
Tel: +39 0431 71821 - Fakso: +39 0431 70449




Rapidpaŝe alproksimiĝas la feria periodo, la plej atendata momento de la tuta laborjaro: finfine ripozo, turismado en vizitindaj lokoj, momenta paŭzo por malstreĉiĝo kaj forgesado de ĉiutagaĵoj. Sed kien iri? Do, ĉiu ajn turisma agentejo povas oferti al vi nenombreblajn proponojn pasigi viajn feriojn: en Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko... - en luksa hotelo aŭ sub tendo - per ŝipo, aviadilo, ĵipo aŭ eĉ kamelo - ĉe maro, ĉe lago aŭ laŭlonge de rivero - tio dependas de viaj deziroj kaj emoj. Sed esperantisto kutime ne bezonas turni sin al tiaj entreprenoj por programi sian libertempadon: sufiĉas malfermi iun ajn Esperanto-revuon por plene kontentigi propran vojaĝemon. Dekoj kaj dekoj da interesaj partoprenindaj aranĝoj okazas kaj okazados ĉie tra la tuta mondo: krom kleriĝi, distriĝi, amuziĝi, amikiĝi, mergiĝintaj en internacia etoso, vi ja konatiĝos kun novaj lando, kulturo, arto, lingvo, medio. Jen kelkaj ideoj:

| | | |
|---|---|---|
| 16-22 majo | 50ª Kongreso de IFEF | Aalborg, Danio |
| 12-20 junio | Somera E-Kurso | Karlskoga, Svedio |
| 05-24 julio | 29ª Somera Kursaro | S. Francisko, Usono |
| 18-25 julio | 71ª SAT-Kongreso | Odeso, Ukrainio |

kaj en aŭgusto de la 1ª ĝis la 8ª

**83ª Universala Kongreso de Esperanto**
Montpeliero, Francio
Temo de la Kongreso
**Mediteraneo - ponto inter kulturoj**

Aliĝis, ĝis la 20ª de marto, jam 2217 personoj!

---

Sed antaŭ ol iri al Montpeliero, venu al Triesto: OSIEK kaj Triesta Esperanto-Asocio invitas vin partopreni en




**INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO '98,**
de la 18ª ĝis la 24ª de julio 1998
Prelegantoj kiaj Maria Butan, Günther Becker, Bruno Masala, Vinko Ošlak, Eugène de Zilah kaj aliaj kompetentuloj prezentos al vi la jenan interesan temon:
**Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo**

Kaj post IEK '98 en Triesto kaj 83ª UK en Montpeliero, vojaĝu al la

## 67ª Itala Kongreso, 22-26 aŭgusto

**_Frascati_ vokas vin kaj invitas vin kunkanti la jenan faman kanzonon:**

### *Ekskurso al la Romaj Kasteloj*



*Nu venu, jen de Marino*
*la granda fest' vinbera,*
*el kranoj nun fontas vino*
*kun ĝojo kaj abund'.*



*Pli bonas ol la ĉampano*
*la vinoj de ĉi lando,*
*kun glaso leviĝas mano*
*de l' tempo de Noa'.*



*Tra l' kampoj vidiĝas pleno*
*da fruktoj, vit' kaj greno.*
*Nun amuziĝu ni,*
*Nani', Nani'.*



## Kiel plifortigi UEA-n?

En la pasintmonata ekzemplero de TEA-BULTENO estis mallonge prezentita Universala Esperanto-Asocio, dum, la 28an de aprilo, okazis prelegeto pri ties historio kaj nuna stato. Ankoraŭ multo estus priparolenda kaj diskutinda, ne nur por pasiva informado pri ĝia ekzisto, sed precipe por plia konsciigo de esperantistoj pri la efektivaj valoro kaj reala utileco de tiu organizaĵo.

Antaŭ ni staras du gravaj celpunktoj: temas pri KAMPANJO 2000, vidalvide al la tria jarmilo, kaj la centjariĝo de UEA. Pri ĉi lasta datreveno, devas pasi ankoraŭ dek jaroj, sed tiuj ja rapide forflugas: intertempe ni engaĝiĝu por kreskigi nian asocion, pli kaj pli varbante novajn anojn, por doni al UEA la eblon potencigi proprajn financajn rimedojn helpe al ĝia agado. Aparte substrekindas, ke ĝenerale la konsisto de iu ajn internacia asocio estas atente ekzamenata de eksteruloj kiuj emas mezuri la gravecon de iu institucio laŭ la nombro de ties membraro.

Sed ni revenu al la unua celpunkto, kiu tre proksimas en la tempo kaj kiu postulas multan sindediĉon kaj multajn homfortojn por konkretigo de tiu strategio. KAMPANJO 2000 startis dum la Adelajda Kongreso, proponante la jenajn agocelojn:

- altigi la nivelon de la movado kaj komunumo;
- altigi la prestiĝon de Esperanto per inform-kampanjoj al neesperantistoj;
- altigi nian influon en internaciaj medioj/organizaĵoj, kiuj rekte aŭ nerekte okupiĝas pri lingvoj.

Pensu serioze pri la suprediritaj punktoj kaj jam nun ekagu, kune kun viaj landa kaj loka asocioj kaj precipe kun UEA por la progreso de nia idearo.

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo:** Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso:** CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349